

Михаил Юрьевич Лермонтов,

## La velo

*tradukita de Konstantin Gusev*

Blankadas velo unusola  
 En la nebula mara blu'  
 Ĉi kion lasis, kion volas  
 En fremdaj landoj serĉi plu?

Ondiĝas kaj la vento spiras,  
 Fleksante l'maston kun fervor',  
 Ve! Ne feliĉon vel' aspiras,  
 Nek de l'feliĉo kuras for.

Ĝin kovras blua rond' ĉiela,  
 Sub ĝi lazuras onda spac',  
 Sed ŝtormon serĉas ĝi ribela,  
 Kvazaŭ en ŝtormoj estus pac'.

*Traduko de la Rusa poemo "Паpyc" de МИХАИЛ ЮРЬЕВИЧ ЛЕРМОНТОВ (\*1814-10-16 – †1841-07-27) en Esperanton de KONSTANTIN GUSEV (†1980-11-09).*

*Arg-545-1095 (2010-06-20 17:39:30)*

*Tiun ĉi poem-esperantigon mi, Manfred Retzlaff, ricevis en 2010-06-20 de s-ro Yenovk Lazian, Leonhard-Hausmann-Str. 58, D-86157 Augsburg, Germanio. Pri K. Gusev (Константин Михайлович Гусев) vidu ankaŭ la vikipedian paĝon [http://eo.wikipedia.org/wiki/Konstantin\\_Gusev](http://eo.wikipedia.org/wiki/Konstantin_Gusev).*

Михаил Юрьевич Лермонтов,

## Das Segel

*tradukita de Maximilian Schick*

Weiß glänzt auf blauer Wasserwüste  
 Ein Segel fern am Himmelsrand.  
 Was sucht es an der fremden Küste?  
 Was ließ es an der Heimat Strand?

Schrill pfeift der Wind, die Wellen schäumen,  
 Und knarrend biegt sich Mast und Spriet.  
 Es jagt nicht nach des Glückes Träumen,  
 Nicht Glück ist es, wovor es flieht.

Hoch über ihm der Sonne Glut,  
 Und unter ihm rauscht blau das Meer,  
 Doch trotzig sucht es Sturm und Flut,  
 Als ob in Stürmen Ruhe wär'.

*Traduko de la Rusa poemo "Паpyc" de МИХАИЛ ЮРЬЕВИЧ ЛЕРМОНТОВ (\*1814-10-16 – †1841-07-27) en la Germanan de MAXIMILIAN SCHICK (\*1884-04-24 – †1968-02-08).*

*Arg-545-2260 (2015-01-24 19:34:51)*

*La poem-traduko troviĝas en <http://langadvice.blogspot.ru/2012/10/blog-post.html>. Pri la tradukinto vidu la retejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Maximilian\\_Schick](http://de.wikipedia.org/wiki/Maximilian_Schick).*